
# La stranga moderna arto de muzikfarado

JOANNE JOHNS (MELBURNO)




Vere, por krei muzikon oni nur bezonas ion simplan kiel la propra voĉo, aŭ du bastonetoj por kunbati. La historio de muzikfarado estas tre interesa sed eĉ en la pasintaj cent jaroj multo ŝanĝiĝis.

Ofte, novaj teknologioj instigas ŝanĝon, ekzemple kiel elektro influis la gitaron, kaj fruaj komputiloj influis la pianon. Sed ne nur temas pri la muzikiloj mem - la registrado ankaŭ profitis de novaj teknologioj kiam ĝi evoluiĝis de analoga ĝis cifera. Kaj nun eĉ publika ludado de muziko havas novan formon, kaj oni povas vidi muzikiston premi butonojn de ilo kiel la suba, por ne nur ludi diversajn ciferajn muzikilojn aŭ sonpecojn, sed ankaŭ por regi ĉiujn imageblajn karakterojn de tiuj.

Ĉi tiu nova revolucio (ebligata de la rapida evoluo de komputiloj) komencis en 2001 per la eldono de softvaro de *Ableton*, kiu nomiĝas *Live*. Ĝi estis nek la nura nek la unua aŭdia softvaro sed ĝi rapide populariĝis pro ĝia unika interfaco kaj ĝia "ĉio-en-unu" metodo. En *Live* oni povas fari ĉiun parton de la muzikumado - verkadon, iteraciadon, registradon, ludadon, aranĝadon, miksadon - eĉ la kreadon de novaj muzikiloj.

Samkiel saĝaj poŝtelefonoj anstataŭigis multajn aliajn ilojn (kiel kalkulilo, fotilo, taglibro, kalendaro, lumigilo, horloĝo ktp), *Ableton Live* anstataŭigas muzikilojn kaj ĉiujn ilojn por ŝanĝi iliajn sonojn, studiojn, sonspacajn ĉambrojn, kaj multe pli.

*Live* estas vaste uzata por moderna muziko kaj ĝiaj iloj influas la novajn stilojn de muziko kiuj estas kreataj. Ĝi estas tre potenca softvaro, kaj tio kion vi povas krei per ĝi estas nur limigata de via imago - mi lastatempe vidis filmeton en YouTube pri kanto kreita en *Live* uzante nur sonpecojn de la kuirado de krevmaizo!



Ableton Push 2



Ableton Live 10